# PACO

N-o.12.

OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

N-o.34. Speciala eldono de LA PACDEFENDANTO, Ĉeĥoslovakio, Okt. 1954


## B I K I N I  M O B I L I Z U  L A  H O M A R O N !

Depost la eksperimento kun hidrogenbomboj ĉe Bikini jam forpasis pluraj monatoj. Dume ni Japanoj atendis, ke la teruraj efikoj de la radioaktivaj cindroj kaj fiŝoj malaperos iom post iom laŭ la forpaso de la tempo. Sed tio ne okazis. Kontraŭe, eĉ en la pluvo sciencistoj konfirmis la ekziston de radioaktiveco. Konsekvence ni devas timi ankaŭ pri legomoj, fruktoj, kaj eĉ pri trinkaĵo. Ne nur la fiŝoj, kaptitaj apud Bikini estas dangeraj, sed ankaŭ en la tripoj de la fiŝoj, kaptitaj en la maro ĉe nia lando radioaktiveco estas ofte trovata. Kion sciencistoj timis jam post la akcidento de Hukuruju-maru n-o.5, tio realiĝis. Nun meteologistoj antaŭtimas, ke eĉ la aŭtuna rikolto de rizo estos malriĉa.

Dume la Japanoj, kiuj jam trifoje suferegis pro la eksplodoj de la atombomboj kaj ĝisoste konvinkiĝis pri ilia krueleco, bolas de indigno kontraŭ ili kaj ekstaris por la movado kontraŭ atom-kaj hidrogen-bombojn. Diversaj organizoj, inkluzive la Japana Pacdefenda Komitato, la Ligo por defendo de la konstitucio, la Universala Homama Asocio ktp. komencis aktivan movadon por kolekti subskribojn kontraŭ la uzado de atom-kaj hidrogen-bomboj. La nombro de kolektitaj subskriboj jam atingis pli ol 10,000.000 kaj konstante ankoraŭ ĝi pli grandiĝas.

La japanaj esperantistoj grandparte partoprenas aktive tiun ĉi movadon. Jen kelkaj ekzemploj :

La partoprenantaro de la Tokai-distrikta Esperanto-kongreso, kiu okazis la 18. de aprilo en urbo Nagoja, unuanime prirezoluciis deklaracion por tuja ĉesigo de la eksperimentado kaj malpermeso de uzado de aton-energio kiel amasmortigilon. La sama deklaracio estis unuanime prirezoluciita ankaŭ de la Esp-kongresoj de la Kjuŝu-distrikto la 2an de majo en Hukuoka kaj de la Kansai-distrikto la 3an de majo en Kobe. La Mija-Esp-Societo eldonis sian apr.-majan n-on kiel specialan eldonon pri la BIKINI-akcidento, kaj dissendis ĝin al korespondantoj de pli ol 30 landoj kaj al diversaj Esperanto-asocioj. Nun Kansai-Ligo de Esp-grupoj, Tokai-Ligo kaj Kjuŝu Esp-ligo komune projektas eldoni broŝuron pri la hidrogen-bomboj. La Esp-grupoj de Kiota Universitato kaj Osaka - Frendlingva Kolegio kune kun la Esperanta Virina Asocio eldonis deklaraciaron kontraŭ hidrogenbomboj. Pere de tiaj laboroj kaj aliaj, la japanaj esp-pacdefendantoj klopodas veki ĉe tutmondaj popoloj ankoraŭ pli grandan intereson rilate al atomaj armiloj kaj aliflanke ili per tia agado atentigas la jap. pacdefendantojn pri la valoro de Esperanto en tiu ĉi batalo.

Ni ankoraŭ pli aktiviĝos nian laboron, por diskonigi tra la tuta mondo la kruelecon kaj terurecon de atomaj armiloj, por poste kun komunaj fortoj povi forigi tiun ĉi dangeron. ./.

Zšt. 01 - 2928-54

Pacdefendantoj esperantistoj el ĉiuj landoj ! Ni urĝe apelacias je via konscienco kaj humaneco,ke vi eluzu vian tutan forton por nia komuna celo,ĉar, se ni permesos okazigi pluajn eksplodojn en event.nova milito,tio signifus la pereon de la mondon!

Hirokazu KAĴI, MIYA-TYO

HIDROGENBOMBOJ MINACAS PEREIGI LA TERGLOBON

D-ro.Charles O.Bostwick,usonkemiisto,transloĝinta al Svedio, esploris interesajn faktojn pri plua grava dangero,kiu minacas al nia terglobo kaŭze de nuraj eksperimentoj per atom-kaj hidrogen-bomboj.D-ro.Ch.O.Bostwick kiu apartenas al neniu politika partio estas esp-isto kaj sekve ankaŭ entusiasma defendanto de la mondpaco. Kvankam jam ekzistas sufiĉaj argumentoj por postuli nepran malpermeson de tiuj diablaj amasmortigiloj,tamen ni opinias tre grava,ankaŭ informi niajn batalantojn pri tiu ĉi nova dangero,kiun konstatis d-ro Ch.O.Bostwick kaj pri kiu li jam raportis al diversaj nacilingvaj jurnaloj :

Kio okazus kun la vivo sur nia terglobo en tiu ĉi epoko de la A-bomboj,H-bomboj,Co-bomboj kaj robotraketoj,se multaj eksplodoj estus inscenotaj dum intencata milito inter "Okcidento"kaj "Oriento",aŭ sekve de nuraj eksperimentoj per tiuj ĉi armiloj speciale,se oni eksplodigus ilin en la supera atmosfero,kie troviĝas la ozona tavolo,protektanta la vivon sur la terglobo kontraŭ la pereigaj radioj de la suno ?

Ekzistas motivo por firma kredo,ke tiu ozon-tavolo estus detruota kaj tiam la radioj de la suno mortigus ĉiun vivon sur nia terglobo en daŭro de kelkaj minutoj antaŭ ol la protektanta ozon-tavolo povus renoviĝi.Ozono troviĝas en la naturo,ĝi estas formata per la efiko de la sunradioj je oksigeno en la malvarmaj,senpolvaj superaj tavoloj de la atmosfero. Tre zorga esploro fare de G.M.B.Dobson kaj aliaj konigas al ni,ke tiu ĉi ozon-tavolo ŝvebas super la tero en alteco de 25 km kaj la tuta kvanto,se ĝi estus ĉe la surfaco de la tero kaj sub la premo atmosfera,sufiĉas fari tavoleton de nur 3 mm. La sciencisto H.N.Russell diras,ke la protektefiko de tiu ozon-tavolo egalas tri folioj de ormetalo. Nur tre malmulte da ozono troviĝas apud la polvoŝarĝita varma surfaco de la tero. Ozono perdas la econ protekti kontraŭ la sunradioj kiam ĝi kombinas kun aliaj materioj aŭ kiam ĝi ŝanĝiĝas al oksigeno,kiu senefikiĝas ĝian protektblecon.En ordinaraj temperaturoj ozono oksigeniĝas tre malrapide. Je 100 gradoj/bolanta akvo/iom rapide.Je 300 gradoj la ok-sigeniĝo estas tuja. La dis-eriĝo de ozono estas multe pli rapidigata en pli malaltaj temperaturoj per uzo de metaloj kaj aliaj substancoj speciale en polva formo. Eĉ argento rezist-pova je oksigeno rapide reagas kontaktante kun ozono.

La protekta ozon-tavolo kaj ĉio vivpova sur la terglobo povas esti detruata per la vastaj nuboj de radioaktiva polvo dissternita tra la ozon-riĉaj tavoloj super la terglobo.

La malluma/nokta flanko/de la terglobo,en tiu tempo ne tuŝata de la sunradioj,estus afliktata de uraganoj kaj veterkatastrofoj.

Fine la sunleviĝo brulante eklumiĝus tiun ĉi tumultejon kaj la ankoraŭ postrestantaj vivoj estus ekstermotaj fare de infero, kiun la homoj por si mem estis preparintaj.

D-ro.kaj s-ino.Ch.O.Bostwick
Ljungaverk - Svedio

Peris: "MEM"-tradukservo,C.Fielding, 61,Phyllis Crescent,/Ely/, CARDIFF,Anglio, per ĝi vi povas kontakti kun d-ro.Ch.O.Bostwick.

NIA GAZETO BATALAS POR LA PACO

Ĉu vi jam sukcesis varbi por ĝi almenaŭ unu novan abonanton en via loko kaj lando ?De la disvastigo de nia organo dependas ĝia pli bona ekipo kaj ebla eĉ pli ofta apero. Klopodu ankaŭ ienete!

## PENSOJ ĈIRKAŬ LA PACO

Ekde la unua elpaŝo de la homa gento ni trovas spurojn de perforto kaj murdo. Tra la mondhistorio etendas nigra strio da elverŝita sango de sennombraj viktimoj. Eĉ la antikvaj Grekoj havis sian mondmiliton. Certe gi estis idila kompare kun la "totala" milito de nia tempo.

Feliĉe la historio ne nur rakontas pri militoj, sed ankaŭ pri ekfloro de kulturoj. Sed por la militorganizantoj la paco nur signifas periodon de militpreparoj.

Sed, eĉ se ĉiuj imperialistoj, ek de Periklo ĝis la nuntempaj monopol-kapitalistoj pro sia potencavideco, detruemo kaj krueleco renversis landojn kaj buĉis homojn, oni tamen ne konkludu, ke la militoj esence estas sekvo de la homa biologia naturo. Ĉar se estus tiel la paclaboro ne multe utilus. Sed nia sociologio instruas, ke la homoj mem faras sian historion kaj ke la radikoj de militoj ĉefe venas el la politika kaj ekonomia situacio.

Tial oni povas demandi sin, ĉu povas en la imperialisma epoko ekzisti alia rimedo ol milito por forigi la misproporciojn inter la evoluo de la produktfortoj kaj la kapitalakumulado unuflanke kaj la divido de la kolonioj kaj influsferoj de la monopolkapitalismo aliflanke ? Ĝis nun ĉiam nova divido de la mondo estis „natura stato" Diverslandaj diplomatoj ofte renkontiĝis, sed ne povis konduki la evoluon en prudentan direkton. Ja ne mankis saĝaj konsiloj kaj avertoj, ke nur per limigo de la armado kaj kunlaboro inter la nacioj eblas sekurigi la pacon. Tiaj voĉoj ehe perdiĝis kaj la bona volo restis plejofte retoreca.

La amasoj ne tiom batalis por la paco, kiom estus dezirinde. Tial la militprovokantoj gajnis la satanecan ludon du foje dum nia jarcento. Tiu altpreze akirita sperto instruu nin, ke, se ne eblas atingi internacian konkordon kaj kunlaboron, ripetiĝos en multe pli granda skalo la tragedio de la antikva Greklando post la Alexandraj militoj, per atombomboj, kemiaj kaj bakteriologiaj armiloj kaj eble ankoraŭ pli teruraj pereigiloj.

La Manifesto de "MEM" deklaras : "Reakciaj politikistoj, industrimagnatoj, magnatoj de komerco kaj financo ne volas la pacon". Kaj ĉar la paco ne venas de si mem, necesas por ĝi batali. En Svedio same kiel en aliaj landoj estas necese sendanĝerigi la pacmalamikojn kaj malpermesi ĉian militpropagandon!

En la svedaj reakciaj partioj kaj militistaj rondoj troviĝas personoj, kiuj pretas enlasi okuptrupojn, por fari el nia lando militejon kaj peli nian junularon en militon. Ili celas jungi nian landon al la agresiva Atlantika Bloko kontraŭ la volo de la plimulto. Ili estas potencaj, ĉar ili posedas la esencajn propagandrimedojn: la gazetaron, radiostaciojn, teatrojn, preĝejojn, lernejojn kaj militistajn organizaĵojn. Ili aĉetas redaktorojn kaj verkistojn por ke tiuj dissemu mensogojn kaj malamon kontraŭ aliaj ŝtatoj kaj ideologie preparu la homojn por la venonta mondmilito.

Tio tamen ne signifas, ke la militinstigantoj en Svedio povos fidi al siaj lakeoj. Ili certe malfidas parton de tiuj, precipe tiujn, kiuj pro sia pozicio estas dependaj de la apogo de la pacamantaj amasoj. Sed krom tio estas tiel, ke en la sveda kapitalista rondo troviĝas tiuj, kiuj opinias, ke la pli frua neŭtraleco estas la plej bona negoco. Al tiuj ne estas fremda la penso, ke estos ankoraŭ foje eble utiligi tiun eventualan ŝancon.

Sed la kerno de la sveda nacio - la laboristoj kaj kamparanoj - estas forte pac- kaj defend-ema. Ili estas pretaj kontraŭstari ĉian atakon kontraŭ la lando. Tio montriĝis en la du mondmilitoj kaj jam en 1905, kiam militaktivistoj volis ataki Norvegion por konservi la tiaman Union. La paca kaj kulturama sveda popolo devas nun agi sammaniere, ĉar ĝi ne povas esti indiferenta koncerne la sociaj kaj kulturaj kondiĉoj. Tio tute ne havas ian ajn rilaton al la burĝa patriotismo, sed estas konforma kun la interesoj de la popolo kaj ĝiaj demokrat. aspiroj.

La pacmalamikoj ne povas ignori
la pacvolon de la sveda popolo.Est-
as pacvolo,enradikigita dum 140 ja-
ra pacperiodo de nia lando.Tial oni
povas nuntempe konstati ŝangon de la
reakcia sinteno rilate al la pacmo-
vado.Dum la grandfinancaj jurnaloj
en la jaroj inter la mondmilitoj of
-te montris malsimpation al la tia-
ma etburga pacmovado,oni nun akcep-
tas ĝin preskaŭ familie.La kaŭzo es
-tas facile trovebla.Potenca tutmon
-da pacmovado naskiĝis kaj kun ĝi
la Sveda packomitato.Kontraŭ ĝi oni
elverŝas sian koleron.Kial ? Ĉar ĝi
ne ripetas la bonintencajn,sed al ne
-nio devigajn deziresprimojn de la
etburga pacmovado,sed ĝi celas pli-
altigi la politikan konscion kaj
senmaskigi la imperialismon por kon
-duki la popolojn kontraŭ la planoj
de la militorganizantoj.

La malpotencon de la sveda etbur-
ga pacmovado ekz.prezentas jena fak
to: Dum internacia kongreso de tiu
Asocio,okazinta en 1953 en Parizo,
svedaj delegitinoj postulis,ke tiu
asocio ŝanĝu sian neŭtralan pozici
-on kaj fariĝu antikomunista. Kaj
kiam la franca sekcio prezentis re
-zolucion,protestantan kontraŭ la
help-programo de Usono por la mili-
to en Hindo-Ĉinio,ĉar tiu helpo pli
longigas la militon,sveda pacamiki-
no f-ino.Nordin kontraŭis.Ŝi konk-
ludis: Ĉu ne tiu helpo de komunista
Ĉinio al la "komunista flanko" en
Hindo-Ĉinio ankaŭ kontribuas al pli
-longigo de la milito ? Se oni pro-
testas kontraŭ la usona helpo, tiam
oni ankaŭ protestu kontraŭ la ĉina
helpo !

Kiel ne pripensita deziro !Ŝi ja
postulis rekte,ke pacamikoj helpu
plifaciligi al imperialistoj la ba-
talon kontraŭ la koloni-popoloj!
Pacamiko devas konsciigi pri tio,
ke la nacia subpremado de la koloni
-popoloj fare de la imperialismo ne
povas signifi,ke la pacamikoj estu
kontraŭ la batalo de la kolonipopo-
loj por ilia rajto liberiĝi sin de
la emperialistaj subpremantoj. La
packonferenco de la asia kaj pacifi
ka regionoj en sia alvoko/1952/kla-
re esprimis la aferon jene :

"La popoloj ankoraŭ sklavigitaj
de fremda jugo komprenas,ke la bata
-lo por nacia liberigo estas nedis-
igeble kunligita kun la batalo kon-
traŭ la milito,kaj,ke la milit-
aj preparoj plifortigas la ĉen-
ojn,kiuj ilin sklavigas.

Sekve la gazetaro de la grand-
financistoj en Svedio aplaŭdis
la kontribuon al la imperialist-
oj de la svedaj delegitinoj ĉe
la packongreso en Parizo.ĝi eĉ
pli havis okazon/kaŭzon/ ĝoji
pri la rezulto de tiu manovro.
Pro tio nome la sveda sekcio de
Paco kaj Libero dissplitiĝis.Ne
malpli ol kvin de la dektri ron
doj en suda Svedio likvidiĝis.
En Stokholmo ses el la naŭ estr
-aranoj rezignis kaj simila si-
tuacio estiĝis en vico de aliaj
lokoj.

Ŝajnas tamen,ke tiuj,kiuj vo-
lis transformi la svedan sekci-
on,faris la kalkulon sen la ma-
stro.La plimulto de ĝiaj anoj
havas la opinion,ne absolute
rompi la kontakton kun la inter
-nacio organizo.

Nova estraro estas elektita
kaj espereble tiu en la intere-
so por la paco ne nur emos al
kunlaboro kun la internacia aso
-cio,sed ankaŭ kun la Sveda
packomitato kaj komprenos,ke la
pacon ne eblas atendi sidante,
sed oni devas ĝin batalakiri.

Ni MEM-anoj,varbitaj al Esper
-anto ĉefe pro ĝia alta pacide-
alo,kunligita kun tiu lingvo,
estas pretaj laŭpove labori ku-
ne kun la cetera pacmovado por
haltigi la pelon de la mondo al
nova milito kaj atingi,ke Espe-
ranto fariĝu unu el la oficial-
aj lingvoj de la pacmovado. Ni
strebu komune por efektivigi la
alvokon en la Manifesto de MEM:

Helpu,ke nia lingvo fariĝu
ilo por vera amo kaj mondpaco !

Helpante per Esperanto sekur-
igi la mondpacon,vi samtempe
grave kontribuas al disvastigo
de Esperanto !

G. Holmkvist

## NI PETAS PACIENCON !

Malgraŭ la malfruiĝo de nia el-
dono sveda/aŭg.n-o./ĝi ankoraŭ
antaŭenvenis nian julian eldon-
on el Japanio.Niaj legantoj de-
vas kompreni,ke la vojo de Jap-
anio estas tro longa kaj tial la
malfruiĝo.Aerpoŝta ekspedo estus
ne rentabla.

## PETRO VAN STAVEREN LIBERIGITA

En la vicoj de la nederlandaj progresemaj pacdefendantoj kaj en la koroj de ĉiuj, kiuj amas justeçon kaj veron estas ĝojo. La 4. de augusto subite malfermiĝis la pordo de la malliberejo en Leeuwarden kaj ellasis Petron van Staveren post 5 jara malliberiĝo.

Ĉu li murdis, ŝtelis au faris ian krimon ? Certe ne ! Sed li estis sendita kiel soldato al Indonesio malgraŭ la promesoj de la nederlanda registaro, certigi la pacon inter la indonesia kaj nederlanda popolo. Petro tie rifuzis mortpafi la por sia sendependeco luktantajn Indonesianojn kaj nur deziris helpi al la pro la milito suferantaj homoj. Pro tio li estis kondamnita por ok jaroj en malliberejon. Sed li restis nerompebla. Antaŭ la juĝistoj kaj en la malliberejo li donis ekzemplon al ĉiuj, kiamaniere praktike batali por la paco kaj ŝirmi tiujn, kiuj ĉiam denove endanĝerigas la mondon.

„Pitojo" /fidelulo/, tiel nomis lin liaj amikoj en Indonesio da kiuj li havis multajn milojn - la junularo, malnovaj batalantoj, intelektuloj kaj la tuta pacmovado, ĉiuj lin admiras kaj sentas, ke li estas homo en plej bona senco de la vorto. Kaj nun finfine, post longaj jaroj li fariĝis denove libera homo kaj pli forte ol iam antaŭe li sentas la interligitecon kun ĉiuj, kiuj batalas por paco kaj justeco.

Merkredo la 4an de aŭgusto li renkontiĝis kun siaj gepatroj kaj fratino, kiuj venis kun tuta karavano da aŭtomobiloj por akompani lin al sia hejmo. Tiu vojaĝo, ĉirkaŭ 250 km, al Hago, estis vera triumfveturo ! En ĉiuj urboj kaj vilaĝoj oni ĝoje salutis lin kaj li jam ne sciis, kien meti la florojn, kiujn la homoj donacis al li. La entusiasmo estis senlima! En la grandaj urboj okazis veraj demonstracioj, montrantaj klare la opinion de la nederlanda popolo koncerne la sintenon de la registaro. Salutis lin popolreprezentantoj, 48.000 indonesiaj sukerlaboristoj, delegitaro de indonesiaj maristoj en la nomo de miloj da kamaradoj ktp. Alvenis salutleteroj el Hungario, Norvegio, Danlando, Svisio kaj Germanio.

Ankaŭ ni, esperantistoj-pacdefendantoj gratulas al Petro kaj ĝojas ne nur pri la fakto, ke li liberiĝis ne rompita por daŭrigi la batalon por la paco, sed ankaŭ pro tio, ke Esperanto estas lia lingvo kaj ankaŭ la lingvo de liaj gepatroj.

Petro ankaŭ promesis al ni, ĝis li almenaŭ iom liberiĝos de la daŭraj vizitoj, skribi raporton por nia organo pri sia restado en Indonesio kaj el la malliberejo.

Ni kore gratulas al li okaze de lia liberiĝo kun la deziro, ke li daŭre restu fidela al nia batalo kaj aktive partoprenu la batalon de "MEM", al kiu li povus esti multe utila.

Ni invitas niajn legantojn, sendi salutojn al k-do. Piet v. Staveren, Zusterstraat 35, DEN HAAG, Nederlando.

Coor de Waart - PLZEŇ.

## KONTRIBUU AL INTERERATIĜO

Nia seminario, kiu pretiĝas diplomitajn instruistojn de arto, decidis alvoki per Esp-o kolektojn de infan-desegnoj /inkluzive pentrajojn, dekoraciojn ktp./ el pluraj landoj por arangi ekspozicion. La ekspozicio estos migranta. Ni deziras havi ankaŭ vian landon en la programo kaj petas vin al kunlaboro. Ni celas sortimenton ne grandan, sed reprezentan. Se la instruado de arto ĉe vi havas komunan direkton aŭ karakterizojn, estos utile ke la elekto tion spegulu. Ĉe ni ekzemple, oni generale akcentas la apartajn kvalitojn de la infana arto: ĝia spontana freŝeco stimulata kaj kompreneme gvidata de la instruist. En aliaj landoj eble la art-instruado havas malsaman fizionomion: eble ĝi estas fondita sur ia viva tradicio de popolarto aŭ sur ia aparta celado ktp. Ĉiu okaze ni lasos al via kompetento la elektadon kaj ni tutkore esperas, ke vi kunlaboros por tiu ekspozicio.

Por la material-kolekto ni ne starigis findaton, ĉar ni esperas ricevi kontribuojn ankaŭ el malproksimaj landoj. Ni ankaŭ

ne limigas la aĝon de la infanoj;
sufiĉas,ke ili estu ĝnoj de lern-
ejo de iu ajn grado.Ĉiu verko de-
vas indiki la sekson,aĝon kaj ad-
reson de la verkinto,laŭeble an-
kaŭ la temon.Se vi opinias,ke la
materialo estas ne kutima aŭ ĉe vi
speciala,ni tre interesigus ekscii
klarigojn pri ĝi.

Ni esperas,ke vi favoros nin per
via ŝatata kunlaboro,ĉu mem kiel
kontribuanto,ĉu kiel helpema per-
anto por la verkoj.

Art Teachers Training Departement,
26,Priory Road,EDGBASTON,Birming-
ham 5. Retto ROSSETTI,lektoro

IOM PRI NIA GAZETO

Kiel respondeculo de nia gazeto,
mi opinias,ke nun estas la momento
diri kelkajn vortojn pri ĝia enha-
vo.Ni ja ricevis kelkajn kritikojn,
kiuj meritas specialan atenton kaj
estas dezirinda,ke ni estonte ricev-
vu ankoraŭ pli da tiuj kaj sugest-
ojn.La PACO estas la voĉo de nia mo
-vado.Tra nia organo oni prijuĝas
nin.Pro tio,ĉiuj MEM-anoj kaj pli
speciale la estraranoj,devas dediĉi
grandan atenton je ĝi kaj nepre di-
ri sian opinion,tiel ofte,kiel ili
povas.

Antaŭ ĉio necesas diri,ke tro of-
te ne eblis kontroli la artikolojn
antaŭ la eldono.La kulpo ne ĉiam es
tis ĉe la eldonintoj,sed ĉe ni ĉiuj
ĉar ne sufiĉa materialo atingis il-
in ĝustatempe.

Ĉehoslov.k-do.protestas kontraŭ
artikolo de d-ro.Halbedl,titolita
"Papo Pio XII,kondamnas la militon"
/PACO n-o.1/.Li opinias ,ke prakti-
ke la papo agas kiel militinstigan-
to. Sed d-ro Halbedl estas konata
pacdefendanto katolika kaj li rajt-
as havi malsaman opinion! Se li ne
povus esprimi SIAMANIERE sian pac-
volon,la pacmovado fariĝus eble nur
komunista kaj fiaskus.D-ro Halbedl
citis frazojn de la papo,Eĉ se temas
pri nur frazoj,estas pli preferinda
ke ili kondamnas militon,anstataŭ
laŭdi aŭ rekomendi ĝin! Ĉiuj dekla-
roj,utilaj al la paco meritas esti
menciataj.Tio estas en la kadro de
la pacmovada programo .Ni do ne es-
tu sektemaj ! Kio estas ekster la
programo de la pacmovado,estas la
komentario de d-ro Halbedl pri rifu
zo de militservo,kaj pri tio mi pa-
rolos pli poste.

Brita estrarano kritikis lafrunt-
artikolon de PACO/islanda eldono/,
ĉar ĝi estas tro"komunista". La
aŭtoro,Arnor Hannibalsson,havas
ankaŭ la rajton esprimi sian pac
-volon,SIAMANIERE,samkiel d-ro
Halbedl.Tamen oni eble povas o-
pinii,ke li nur prezentis la ko-
munistan vidpunkton pri la tuta
politiko nuntempa kaj ne ĉiam
restis en la kadro kaj programo
de la pacmovado. La titolo-mem:
"Defendi Pacon kaj Socialismon
estas defendi Kulturon", estas
ne akceptebla por ĉiu pacamiko,
ĉar la pacmovado ne estas nur
socialista movado! Kaj fruntar-
tikolo kutime reprezentas en
ĉiuj ĵurnaloj,la ĝeneralan opi-
nion de la tuta estraro.

Mi jam havis okazon kritiki
aliajn artikolojn,kiuj aperis en
PACO. Ian oni propagandis por
katolika libro,jam oni propagan
-dis por komunista kongreso,sen
ia ajn rilato kun porpacaj pro-
blemoj.Aliflojn oni vekis tute
teorian diskutadon pri integra
pacifismo,sekve de kio leganto
skribis al ni,ke oni devas en
ĉiuj landoj rifuzi militservon,
ke la socialismaj landoj devas
senatende senarmiĝi por montri
la ekzemplon. Al tio mi povus
respondi,ke la kapitalistaj
landoj tuj profitus de tiu do-
naco por invadi ilin kaj detrui
tiun socialismon,kiun ili neni-
am digestis ... kaj tia"paco"
signifus sklavecon,koloniismon
por tri kvaronoj de la homaro,
karceron,koncentrejon,morton
por ĉiuj progresemuloj.

La realeco estas tia,ke en
la mondo ne troviĝas nur hone-
stuloj,Kaj honestuloj ne volas
esti murdataj de banditoj.Pro
tio ili ankoraŭ bezonas armil-
ojn kaj neniu povas konvinki
ilin,ke ili devas akcepti la
leĝon de la banditoj.Pro tio la
senarmiĝo povas nur efektiviĝ-
ĝi iom post iome,samtempe kaj
kontrolate.Sur tiu bazo,ĉiuj po
-vas konsenti,eĉ se iuj prefe-
rus pli radikalajn solvojn,ĉu
ne ? Kaj se ni interkonsentas,
ni agu komune,forigante la pro
-blemojn,kiuj nin dividas!

Tro ofte ni forgesas,ke la
pacmovado ne estas heterogena
miksaĵo de diversaj,eĉ kontraŭ
-aj propagandoj,kaj "MEM"estas
nur fako de la Pacmovado.Ni ne
estas tie por disrompi nian per-

scian opinion al aliaj pacamantoj.Ni ne estas tie por perdi tempon en teoriaj kaj nebulaj diskutadoj.

La pacmovado serĉas la sintezon de ĉiuj opinioj pri preciz- aj problemoj aktualaj.Ĝi ne pro-ponas idealajn nek idealistajn solvojn,ne realigeblajn en la nuntempa mondo.Ĝi proponas prak-tikajn solvojn,akcepteblajn de ĉiuj homoj,de ĉiuj organizoj,de ĉiuj popoloj,kiuj sincere dezir-as la pacon.Kaj kompreneble ti-uj solvoj ne povas reprezenti la ideojn nur de unu partio,nur de unu organizo aŭ nacio.

La pacmovado instigas antaŭ ĉio al agado,por altrudi la sol vojn postulatajn de la popoloj. Tion ankaŭ ni tro ofte forgesas.Nia gazeto ne devas nur informi,ĝi devas instigi al agado. Ni devas imagi nian gazeton kiel oficialan esp-eldonon de la pacmovado.

Tio ne signifas,ke ĝia enhavo devas esti tro rigida,ke oni de-vas sisteme malhelpi la diversajn esprim-manierojn de niaj anoj.Mi konscias,ke mi ne povas aspekti kiel senkompata cenzuristo,kaj mi petas pardonon,se mi ankaŭ faras erarojn sur tiu kampo,ĉar la tasko estas tikla kaj malfacila. La pacmovado estas ankaŭ lernejo de Unueco kaj Toleremo kaj tiu lernejo postulas tre seriozan studadon. Nia gazeto estas ankoraŭ juna kaj al ni ĉiuj mankas la necesa spe-rto.Pro tio mi kredis utila ti-un artikolon por la estonto de "MEM"kaj ĝia organo"PACO".Por eviti laŭeble erarojn,ni ĉerpu instruon el la nacilingvaj gaze toj de la pacmovado kaj prenu el ili la necesan inspiron por nia gazeto kaj nia movado !

W.Gilbert

## NIA UNUA PAŜO

El Finlando ni ankoraŭ ne povas raporti pri grandaj sukcesoj,ĉar nur antaŭ nelonge ni ekkontaktis kun "MEM".Ni dissendis cirkuleron al esperantistoj de nia lando,sekve de kio multaj jam farigis abonantoj de la "PACO" kaj aktive kunlaboras. Baldaŭ ni aperigos artikolon de k-do.Meltti,prez.de finlanda packomitato. P.Heikkinen-

## Malferma Letero al Esperantista Pacamiko X.en Polio

Ne timu,mi ne publikos vian nomon,eĉ/laŭ via peto/mi evitos uzi sur poŝtsendaĵoj/al vi/Esp.-propagandilojn.Tamen via letero bezonas publikan respondon,ĉar vi ne estas/bedaŭrinde/la sola,kiu malpravan timon,sentas.

Eble por vi ŝajnas la afero stra-nga,sed fakte estas,ke la MOND-PACA ESPERANTISTA MOVADO rapide progresas precipe en la popoldem. landoj,eĉ ni devas limigi pro ekonomiaj kaŭzoj la sendadon de "PACO" al tiuj landoj.Ili atingas pli ol la 1/2 de nia tuta eldono.

Kial do - se la afero laŭ vi estas tiom "dangera"oni trovas tiom da batalantoj,kiuj per Esperanto kuraĝas labori por la mondpaco ? •

Sed pli kurioza afero estas, ke eblas konstati nek unu kazon en kiu aŭtoritatuloj estus punintaj pro tiu "dangera"laboro niajn pac-amikojn!

Kompreneble,vi havas"gravajn kaŭzojn"diri..."ĝis kiam la Esp-movado denove ne troviĝos en la Sovjetunio,kiel iam antaŭe,ĝi ne sukcesos ion fari". Mi bedaŭras, ke vi ne skribas kiel ni povu re-vivigi tiun movadon en Sovjetio: ĉu per nenionfarado,aŭ per uzo de Esperanto por utilaj kaj praktikaj celoj ?

Mi esperas,ke vi regule ricevas nian organon.En ĝi vi certe legis ke gravaj personoj de la pacmovado simpatias kaj helpas al "MEM". Inter tiuj estas ankaŭ s-ino.Eug. Cotton kaj Pietro Nenni.La pasintan semajnon mi havis la honoron paroli kun la generala sekretario de la monda packonsilantaro Jean Laffitte en Vieno.Li ege afable aŭskultis miajn informojn kaj respondis miajn demandojn.Tiu malfermas al ni grandajn eblecojn por kunlaboro.

Kvankam"MEM"estante kreita nur antaŭ 8 monatoj,ĝi rapide gajnas la konfidon de estroj de la granda monda pacmovado.Sed ni ne povas atendi,ke la aliaj faru nian laboron.S-ino Cotton prave al ni skribis: ..."ONI TUTE NE VOLAS IGNORI VIN,MI NUN ESTAS CERTA PRI TIO,SED APARTENAS AL VI,ESP-ISTOJ, KONIGI VIAJN EBLECOJN AL ĈIUJ ALI-AJ PACPARTIZANOJ KUNIGANTE VIN

AL ILI EN LA BAZAN LABORON !"

Ni čiuj scias,ke Esperanto havas multajn kontraŭulojn.Bedaŭrinde la plej granda nombro da homoj emas,ke oni donu al ili efektivigitajn ideojn.Ili ne ŝatas pripensi la faktojn,analizi la kaŭzojn kaj per sia "propra" cerbo decidi siajn agojn.

Ni,MEM-anoj komprenoble ne akceptas la opiniojn de tiuj teoriuloj,kiuj sen iom scii pri Esperanto,kondamnas ĝin.Kontraŭe, al tiuj teoriuloj ni ankaŭ rajtas diri nian opinion.

La defendo de la paco ne estas privilegio de kelkaj personoj, sed devo de tuta popolo.Tial ni, parto de tiu popolo servas al tiu alta idealo per tre taŭga pacilo,nia internacia lingvo kaj neniu racie pensanta persono kuraĝos al ni malpermesi tiun ĉi rajton.

En via letero vi komparas vian agadon kun la agado de esperantistaj pacamikoj de alia popoldemokracio kaj vi skribis: "Nia landa Esp-movado ankoraŭ ekzistas kiel movado organizita....kaj en alia popoldemokracio ĝi likvidiĝis mem." Se nia majstro kaj via samlandano d-ro.Zamenhof,estus kreinta la internacian lingvon por esti uzata nur inter samlandanoj,tiam vi povus fieri pri via"movado organizita".Sed la kreinto de Esperanto havis pli grandan celon kaj en tiu senco vi devas esti malpli fiera pri via agado.

Kie oni"likvidis sin mem",tie ili jam nun estas en la unua vico de la MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO ! En tiu lando troviĝas veraj pacbatalantoj,kiuj ne timas stultajn argumentojn de kontraŭuloj kaj sekvis la sanajn impulsojn de sia pacama konscienco. Ili ne atendis"oficialajn aprobon kaj permeson"por labori por la bono de la homaro - por la tutmonda paco !

Ni scias,ke ni renkontiĝos ankoraŭ kun multaj malfacilaĵoj. Misuzo de Esperanto por celoj, kiuj estas kontraŭ la vera interkonatiĝo interfratiĝo kaj mondpaco donis al niaj kontraŭuloj okazon malutili nin.Kontraŭ tiuj malbonaĵoj la "MEM" per sia MANIFESTO,donas en viajn manojn efikan argumenton.

Kiel lingvon,neniu kapablas per faktaj argumentoj kontraŭbatali Esperanton.Kiam iu el tiuj kontraŭuloj akceptas diskuti kun ni pri tiu temo,ni simple diru al li :

"Imagu ekzemple,ke vi devas transiri riveron,trans kiu troviĝas bele konstruita,forta kaj taŭga ponto.Apud la ponto ĉe ambaŭ bordoj kreskas du arbetoj. Vi venas al mi,kiu estas gardisto de la ponto,kaj diras: -Mi devas iri al la alia flanko de la riverego.Permesu,ke mi uzu la ponton. -Kaj mi respondus : Kion?! Vi volas uzi la ponton ? Vi stultulo! Vi idioto! Vi kosmopolito! Vi uzu naturan vojon! Atendu ĝis la du arbetoj ĉe ambaŭ bordoj largkreskos,ĝis iliaj branĉoj kuniĝos,kaj tiam vi facile trans ili transiros la alian flankon !"

Tute certe ni ricevus de vi vangofrapon.

Kiu volas atendi la evoluon kaj kunfandiĝon de la lingvoj, por uzi ilin kiel "ponton" tiu povas tiel agi.Ni ne kontraŭas. Sed,ĉar ni estas revoluciuloj, lasu al ni uzi tiun artefaritan ponton,kiu estas Esperanto,kondukanta al interfratiĝo de la popoloj kaj mondpaco.Ni sekvos tiun vojon,ĉu la stulta pontgardisto permesos aŭ ne!

A.Balague - St.Pölten

## MILITINSTIGANTOJ MEDITU !

Ministroprezidanto de Sovjetunio,G.M.Malenkov diris en kunveno de nacio-deputitaro jenon: ...."Agresemaj rondoj konservas memvole atmosferon de milithisterio,ili minacas la mondon per hidrogenbombo,ili publike proklamas ideon de fortpolitiko kaj de longdaŭra "malvarma" milito,ili kuraĝas minaci kaj timigi.

Kion ni diru tiurilate ?

Unuavice jenon: Oni scias,ke en Sovjetio regas atmosfero de

optimismo, certeco, paca kaj krea laboro. En Usono – kiel la amerikaj oficialaj rondoj mem konfesas – la atmosfero estas tamen venenigita de timo, teruro kaj angoro. Tia do estas la rezulto de la politiko de minaco kaj timigo.

Plue, la sovjeta registaro defendis kaj defendas la vidpunkton, ke la kapitalista kaj socialista sistemoj povas vivi apude kviete kaj pace kaj konkuradi reciproke ekonomie. Laŭ tiu ĉi vidpunkto ni efektivigas konsekvence politikon de paco kaj subteno de internacia kunlaboro. Se tamen la agresivaj rondoj, fidante la atomarmilon, decidigus al freneza ago kaj volus esplori la forton kaj potencon de Sovjetio, ili povas esti certaj, ke ĉiu agresanto estos venke pereigita per la sama armilo kaj ke tia aventuro venigos nepre pereon de kapitalista socia sistemo. Pri tio ja konvinke atestas la historio mem laŭ la rezultoj de la unua kaj dua mondmilitoj. Post tiuj ĉi nome la regosfero de la kapitalismo estis konsiderinde malvastigita. Ĉiuj scias, ke sekve de ambaŭ mondmilitoj jam pli ol triono de la homaro forigis la kapitalismon.

Dum la nuna stato estiĝas demando: Kia estas la ĉefa tasko de la pacemaj fortoj? Granda misio de ĉiuj pacbatalantoj bazas sur la tasko, ke ili detruadu la intencojn de la agresemaj rondoj, ke ili postulu pluan mildigon de internacia tensio, ke ili laŭeble helpu la pacan kunlaboron de ŝtatoj.

La vivinteresoj de la homaro postulas efektivigi la malpermeson de atomarmiloj. Malebligi la uzon de eminenta invento de la homgenio – la atomenergion por amasa ekstermado de la civitanaro, por detruado de urboj, industri-, kultur-, kaj scienco-centroj, tia estas la tasko. La sovjeta registaro penas atingi efikan solvon de tiu tasko. La sovjeta registaro samtempe celis kaj celas generalan kaj fundan redukton de armilaro kaj armitaj fortoj.

Nu, militinstigantoj, ĉu vi konsciiĝas pri la faktoj de la historio? Aŭ – ĉu eble regas vin la ideo: Se ni devos perei, pereu kune la tuta homaro! ? Tamen atentu! Naŭdek naŭ procentoj de la tuta homaro sopiras vivi, deziregas demeti zorgojn pri la estonto! Ili ne volas labori per glavo sangon soifanta, ili ne volas murdi aŭ pereigi!

/tradukita el RUDÉ PRÁVO n-o. 116-1954/

Ing. Jar. Řebíček
Ĉeĥoslovakio.

## ĦOJ PRI GENEVO

Dum la ĝeneva konferenco aŭdiĝis ankaŭ voĉoj en la mondo, ke la militon en Vietnamo kaŭzis la indiĝenoj, ĉar ili atakis la siajn regantojn. Do verŝajne la indiĝenoj pruvas, ke jus ili ne ŝatas la pacon, ja oni povus konkludi, ke ili estas la kaŭzo de tiu milito, ke ili estas murdemaj kaj rabemaj ribeloj. Nu, ni ne povas ja laŭ niaj propraj cirkonstancoj imagi tiujn, kiuj vivas en koloniigitaj landoj. Kvankam ni parte spertis similon dum la pasinta milito per la konduto de regemaj invadintoj. Sed estas necese ekscii ion pri la konduto de la regantaj koloniposedantoj, nur poste ni komprenos, kial estis devigitaj la indiĝenoj elekti el du eventualecoj la – malpacon. Estas klare, ke la kaŭzo de milito por liberigo estis sole – MALESPERO pri la justeco de la superregado. Tion eble praviĝos vortoj, kiujn skribis al sia ĉeĥoslovaka korespondanto aŭstralia s-ano:

"Post malmulte da tempo neniu Okcidentulo tenos eĉ piedlokon sur la azia kontinento; nenio povas savi Indoĉinion por la Francoj, kies teruraj krueloj kontraŭ la Vietnamanoj dum jardekoj krias al ĉielo por vengo. La torturo, kiun ili afliktis sur la kompatindaj indiĝenoj de Indoĉinio estas nenomebla .... ili nun rikoltas la venenajn fruktojn de tiu malkristana agado."

Por ni esperantistoj tia malhoma konduto de homo al homo estas nekoncepteb1a, ĉar ni ne konas diferencon laŭ nacio, raso, religio. Ni estimas nin reciproke, ni ne spertas humiliĝon, ni ne ŝatas regi unu la alian. Ni volas tamen batali – sed sen armiloj por akiri pacon kaj sendependecon por la tuta homaro. Interkompreniĝante per komuna lingvo, ni facile trovas solvon de problemoj tiusence, ke ĉiu trovu siajn homajn rajtojn tiel, ke ili ne malhelpu la alian.

Ing. Jar. Řebíček, Ĉeĥoslovakio.

## PERANTOJ de MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

/Tiuj ĉi perantoj ne korespondas, nek interŝanĝas p.m.ktp., sed nur informas pri organizaj aferoj kaj akceptas abonojn por nia organo!/

AŬSTRIO: Franz Wagner, Unionstr.10 Zim.12, LINZ.

AŬSTRALIO: St.BENNETT, 62 Brighton Av., CROYDON PARK, N.S.W.

BRITIO kaj USONO: Brita Esperanto Packomitato, 15 Twisden Road, Highgate, N.W.5, LONDON.

BELGIO: Fr.Debaene, 25 avenue des Naiades, WATERMAEL-BOITSFORT.

BULGARIO: Borislav Angelev Velev, Str.Stalin 5, GOCE DELĈEV.

ĈEĤOSLOVAKIO: Frant.Lička, Březí č 12, OSTRAVA-Zábřeh.

DANLANDO: Willy Nielsen, Kirkegaardsvej 54, HJØRRING.

FRANCIO: J.Douard, 5 rue de la Prévoyance, VILLEURBANNE, /Rhone/.

FINNLANDO: Paavo Heikkinen, Apollonkatu 4 A.5, HELSINKI.

GERMANIO/DDR/: Helmut Löffler, Theaterstr.1, MITTWEIDA/Sachsen.

HUNGARIO: Pál Balkanyi, p.adr. Magyar Nemzeti Bank, Fiokiroda, BUDAPEST 54.

ISLANDO: Thorstein Finnbjarnarson Njálsgötu 48, REYKJAVÍK.

ITALIO: Arnoldo Opisso, Via Assarotti 10, GENOVA 25.

JAPANIO: Kansai Ligo de Esperan. Grupoj, Nakacu-hamadori 2-20, Oojodo-ku, OSAKA, /k-do.Mijamoto M. rifuzis kaj ni serĉas alian/.

NEDERLANDO: Hub.Hermans, Pr.Bernhardstraat 4, VAALS /L/.

POLIO: Inĝ.Zdislaw Glajcar, Skr.3, CIESZYN, Woj.Stalingroskie.

SVEDIO: Karl Kvist, Box 109 a, DEJE.

ALIAJ LANDOJ: proponu sian peranton, aŭ kontaktu rekte kun nia sekretario: K-do.Anton Balague, Kirchenweg 12, SANKT PÖLTEN, Aŭstrio.

KOREKTIGO: en la aug.n-o.oni erare anoncis abonkotizon de "PACO" por Ĉeĥoslovakio 8.-Kčs - Fakte la jarabono kostas 12.-Kčs.

## MUNICIO POR NIA BATALO:

| | | |
|---|---|---|
| K-do.Frant.Lička, Ostrava... | 10 | Kčs |
| K-di.Il.Severa, Suchdol..... | 1.50 | " |
| K-do.Vl.Sládeček, Karviná... | 10 | " |
| K-do.J.Rakyta, Hroby....... | 6 | " |

## KORESPONDI DEZIRAS:

K-do.Dušan KOSTOLNÝ, Slobodáreň I, PRAKOVCE, Gelnica, Ĉeĥoslovakio, interŝanĝ.il.p.k., gazet.ktp.kun ĉiuj landoj. Respondo certa.

K-do.Frant.PYTLOUN, Leninova č.518, LIBEREC I., Ĉeĥoslovakio, donas korespondajn Esperanto-kursojn al izolitaj interesuloj. Bonvolu aldoni p.m.por respondo.

K-dino.Julie BOUCHALOVÁ, Žižkova 18 PÍSEK, Ĉeĥoslovakio, kun ĉ.landoj il.p.k.kaj leteroj.

K-do.Pavel LIPKA, Luční č.50, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, per il.p.k.kaj leter. interŝanĝas p.m.kun ĉ.landoj.

K-do.Jan ŠKUDERA, Dukelské nám.27, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, kun Aŭstrio, Okc. Germanio, Svisio kaj transmaraj landoj per filatele afrank.leteroj. Interŝanĝas p.m.

K-do.Eduard V.TVAROŽEK, Hviezdoslavova ul.2/III, MARTIN, Ĉeĥoslovakio, deziras ricevi konsilojn pri plej bona metodo instrui Esp-on al infanoj samtempe kun la gepatra lingvo.

K-dino.Věra WENISCHOVÁ, Marxova 24, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj pri muziko, literaturo kaj pentrajoj. Nepre respondas al ĉiu.

K-do.Jaroslav KOTEK, Tř.1.máje č.89 PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, per il.p.k.kun ĉiuj landoj.

K-do.Bohuslav BULÍN/13jara/ PLZEŇ, Na Roudné č.10, Ĉeĥoslovakio, dezir. interŝanĝi desegnaĵojn, il.p.k.kaj p.m.kun ĉiuj landoj. Certe resp.

K-do.J.RAKYTA/instruisto/ KLÁŠTOR pod Znievom č.114, Slovakio, ČSR, kun gejunuloj de ĉ.land.pri naturo, geografio kaj historio. Interŝ.il.pk. librojn kaj revuojn. Certa respondo

ADRESŜANĜO: K-do.Vlad.SLÁDEČEK, laste kiel maristo en Sczecin-Polio nun loĝas: Havlíčkova 19, KARVINÁ I, Ĉeĥoslovakio.

## LANDAJ PERANTOJ ATENTU!

Al la ĉeĥoslov.peranto restas 100 ekz-oj de la aŭgusta "PACO" rezervaj, ĉar li ne povas uzi kiel propag. n-ojn, kaŭze de tio ke "MEM" ankoraŭ ne kapablas liveri regule al li tian kvanton el ĉiuj landaj eldonejoj. Kiu peranto povus tiujn 100 ekz. uzi, petu ilin ĉe la ĉeĥoslovaka peranto.

Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO, TATRA, n.p. K O P Ř I V N I C E
Redakcio: Rud.BURDA, Palackého nám.č.6, P L Z E Ň, Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O